

# PENSEO

N-ro 215

sept. / 2009

Monata Beletra Revueto en Esperanto  
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 20-a jaro <http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm>

## Recenzo

### Legenda Abolita ĉefurbo

#### Guozhu (Ĉinio)

##### 1 Legenda Abolita ĉefurbo

Ĉinoj havas preferon pri la cifero "ok", ĉar ĝia prononco en la ĉina lingvo homofone rimas al la vorto "prospero". Sekve datoj kun cifero "ok" estas rigardataj kiel bonaŭguraj kaj bonvenindaj. Ekz-e la solena inaŭguro de la 29-aj Olimpikoj estis intence okazigita en 2008-08-08 je la 8-a horo vespere en Pekino. Post unu jaro, venas alia dato 2009-08-08, informoj pri la romano *Abolita ĉefurbo*, verkita de ĉina fama verkisto Jia Pingwa, vekis mian atenton. Laŭ informo de ĵurnalo ĉina Komerco, ke la inaŭguro de *Trilogio de Jia Pingwa* okazos en 2009-08-08, en la Literatura kaj Arta Muzeo de Jia Pingwa. La aŭtoro ĉeestos la solenon kaj donos aŭtografojn al legantoj, kiuj aĉetas la novajn librotrion aŭ la duan eldonon de la *Abolita ĉefurbo*, kiu travivis 17 jarojn da severa malpermeso kaj nun rajtas reaperi formale. Inaŭguro tiun tagon ankaŭ la retejo de la Literatura kaj Arta Muzeo de Jia Pingwa.



##### 2 Komenco debita

La 21an de februaro, 1993, noktmeze, Jia Pingwa elskribis la lastan vorton de *Abolita ĉefurbo*. Ellaboriĝis la manuskripto de la romano en 400 miloj da ideogramoj. Antaŭ ol Jia Pingwa foriris la gubernion Hŭian, Shaanxi-provinco, kie li verkis la romanon, informo pri tiu nova romano jam flugis al diversaj lokoj tra ĉinio. Antaŭ ol sia publikigo, la romano *Abolita ĉefurbo* jam anticipe furoris. Pli ol dek eldonejoj sendis la plej kapablajn el siaj redaktoroj por trovi la aŭtoron kaj por akiri la manuskripton. Dume la libro-distribuantoj de diversaj librejoj ankaŭ atente atendas ĉe la eldonejoj por ĉasi la "kukon".

Komence la *Abolita ĉefurbo* aperis en la revuo *Oktobro*, n-ro 4 de 1993. Samjare la Pekina Ekdonejo faris la unuan eldonon, unuafoje en 100 miloj da ekzempleroj; post duonmonato en pliaj 300 miloj da ekzempleroj; kaj post unu monato la eldonkvanto atingis milionon kaj 200 miloj da ekzempleroj. Krome, estas aliaj ses eldonejoj, kiuj "lu-prenis la kliŝojn" kaj samtempe presas respekte po pli ol 100 miloj da ekzempleroj. Laŭ rememoro de Jia Pingwa: *Abolita ĉefurbo* tiam ĝuas debiton.

##### 3 Malpermeso rapida

Sed la vetero subite ŝanĝiĝis. Nur tri monatojn post sia publikiĝo, la romano *Abolita ĉefurbo* estas oficiale malpermesita de la Pekina Buroo de Novaĵo kaj Eldonado pro jena kulpo: "Trivialeco, kun miksitaj erotikaj priskriboj."

Fakte, ke en literaturaj verkaĵoj miksiĝis

erotikaj priskriboj, ne estas senprecedenca. Tamen, en sia romano Jia Pingwa uzis multajn malgrandajn kvadratojn tie, kie la vortoj estas forstrekitaj. Kaj li ankaŭ memkonfese indikis ke "ĉi tie la aŭtoro forstrekis xxx ideogramojn el la teksto". Jen:

[ekzemplo 1.]

La virino volas radikale forigi al si la ŝtrumpojn, sed Zhuang Zhidie (La Papilio de Zhuangzi, protagonisto de la romano) diris, ke al li tre plaĉas la inaj piedoj tiel en pikkalkanumaj ŝuoj. Do, ŝi alte levis siajn du kruojn, starante sur la lito faris multajn ir-revenajn piŝtojn (ĉi tie la aŭtoro forstrekis 379 ideogramojn). Tordante sian korpon, la virino laŭte amorkriis kaj ĝemveis. Tion Zhuang Zhidie neniam travivis. Subite fortiĝis la konkeremo de viro. Li faris senĉese centojn da movoj tamen sen tro frua ejakulo. Pri tio eĉ li mem sentis grandan miron. Al Tang Vanjo jam delonge ruĝiĝis la rozvangoj. Kun senordaj nigraj haroj ŝi eksidiĝis dirante: "Lasu min ŝanĝi pozicion por vi!" ŝi descendis de la lito kaj ekkuŝis kun brusto sur la litrandon.....

[ekzemplo 2.]

Zhuang Zhidie diris: Nu, bone. Kaj li levis la du kruojn de la virino, por rigardi la truon. En granda honto la virino haste diris; Ho, ne, ne! Sed al ŝi jam mankas forto por diri. Kaj io elfluis jam de tie. Poste, ŝi tiris litkovrilon, ŝtopis sub sian kapon, kaj nur rigardis en spegulon. Ĝis kiam la virino ekkriis, Zhuang Zhidie tuj alrapidis ŝtopi per sia lango. Ambaŭ nur anhelis spirege. (ĉi tie la aŭtoro forstrekis 500 ideogramojn) .....

#### 4 Severaj konsekvencoj

Tiuj okulpikaj malgrandajn kvadratojn

kaj indikoj pri la nombro de la forstrekitaj ideogramoj, laŭ opinio de iu komentariisto, "evidentigis tabuojn, kaj samtempe ankaŭ ofendis la evidentigitajn tabuojn".

Rezulte sekvis jenaj konsekvencoj:

Malpermeso al la eldono de la romano kaj ankaŭ koncernaj komentarioj pri ĝi;

Malpermeso al produkto de kino- kaj televid-filmoj pri ĝi;

Pun-mono de miliono da dolaroj RMB far la eldonejo;

S-ino Tian Zhenying, la respondeca redaktoro, estu eksigita pli frue;

La aŭtoro Jia Pinwa estu kritikata;

Leginte la romanon, s-ino Han Junfang, la edzino de Jia Pingwa, rigardis la aŭtoron kulpa, almenaŭ je "spirita perfido al geedzeco", kaj per tiu motivo eksgeedziĝis.

#### 5 Furoro de pirataj eldonoj

Kio poste okazis, tute ekster la imago de la aŭtoro kaj la malpermesantoj.

Ĝuste kiam la oficialaj eldonoj de la romano estas malpermesitaj, aperis nuboj da diversaj pirataj eldonoj furore.

En libroŝranko de la legoĉambro de Jia Pingwa, bonorde viciĝas dekoj da malsamaj *Abolita ĉefurbo*, krome ankaŭ derivitaj "gefratoj" ekz-e *Abolita Deziro*, *Amora ĉapitro*, *Volupta ĉapitro* ks. Jia Pinwa konigis: "La enhavo de tiuj libroj ĉiuj estas la samaj, senescepte pirataj versioj de la *Abolita ĉefurbo*."

Kaj la nombro de la pirataj eldonoj, kiujn Jia Pingwa mem kolektis, jam superis 60. Jia Pingwa klarigis: "Mi ne intence kolektis. Ili venas ofte en la okazo kiam legantoj petas de mi aŭtografon. Trovinte ilin pirataj eldonoj, mi rezervis ilin."

Laŭ nekompleta statistiko, dum la pasintaj 17 jaroj, la nombro de la oficiala kaj duon-oficiala eldonoj de la *Abolita ĉapitro* resume estas pli ol miliono da ekzempleroj,

sed tiu de la pirataj eldonoj eĉ superis 12 milionojn da ekzempleroj!

Ĉar la pekina malpermeso validas nek por la pirataj nek por eldonoj ekster Ĉinio (ĉina ĉeftero), kaj ankaŭ Hongkong eldonis, tial, oni povas tiel diri, kie estas ĉinoj, tie estas la romano *Abolita ĉapitro*. Iuj vizitis Afrikon kaj ankaŭ trovis ĝin tie.



## 6 Femina Premio

Dum tiu tempo, *Abolita ĉefurbo* furoris ekster ĉinio. ĝi estis tradukitaj en pli ol dek lingvojn: japana, franca, rusa, angla, korea, vjetnama...Nun Usono faras novan tradukon. Post publikigo en Japanio, japana amiko skribis al la aŭtoro, ke “*Abolita ĉefurbo* portas freŝan venton al la eldonista rondo de japanio. Iu fama persono en japanio alvokis, ke tiu, kiu vojaĝos al ĉinio komerci, ĉiu kunportu la nomitan romanon.”

La 3an de novembro, 1997, *Abolita ĉefurbo* estis honorita de la literatura Premio Femina, unu el la tri plej gravaj premioj en Francio. Nun ni ankaŭ povas legi la konigon kaj rekordan noton pri nomlisto de premiitoj en interreto:

<[http://en.wikipedia.org/wiki/Prix\\_Femina](http://en.wikipedia.org/wiki/Prix_Femina)>

*The Prix Femina is a French literary prize created in 1904 by 22 writers for the magazine La Vie heureuse (today known as*

*Femina). The prize is decided each year by an exclusively female jury, although the authors of the winning works do not have to be women. The winner is announced on the first Wednesday of November each year.*

1997 : La Capitale déçue (The Abandoned Capital) - Jia Pingwa

Ke ĉina verkisto Jia Pingwa akiris premion en fremda lando, ĉinaj enlandaj ĵurnaloj ne povas ignori. Sed iom strange, en la informoj far ĉinaj ĉefaj ĵurnaloj, ili senescepte kaŝis la nomon de la premiita libro *Abolita ĉefurbo*. Do, ĉinaj popolanoj nur informiĝis ke iu romano de Jia Pingwa gajnis premion fremdlande, sed neniu sciis: kiu libro de Jia Pingwa akiris la premion (? )!

## 7 Akravida profetaĵo

La malpermeso povas nuligi la normalan eldonon de *Abolita ĉefurbo* en Ĉinio, sed ne povas nuligi la malsamajn opiniojn en koro de legantoj. Jia Pingwa ĝis nun ne povas forgesi tiujn subtenojn al li en la malfacilaj tagoj.

Estimata s-ro Ji Xianlin (1911-2009) diris profete en Pekino: “Post 20 jaroj la *Abolita ĉefurbo* brilegos sorĉe.” Siatempe oni eĉ ne kuraĝas ke tio estas parolo de veterano Ji Xianlin.

Alia verkisto s-ro Ma Yuan (1953-) tiel komentis pri *Abolita ĉefurbo*: “Kiam niaj nepoj kaj pranepoj legas romanojn de nia epoko, kiu interesos ilin? Eble dek, aŭ cent, eble nur du aŭ tri libroj, sed mi estas senduba, ke inter ili certe troviĝos *Abolita ĉefurbo*. Mi firme kredas pri tio, ĉar *Abolita ĉefurbo* estas elstara libro, kaj facile legebla kaj leginda. ĝi certe restos ŝatata en venontaj jarcentoj.”

Tiaj opinioj kaj pritaksoj donis al Jia Pingwa multe da konsoloj kaj esperoj.

Kiam *Abolita ĉefurbo* post 17 jaroj reaperas en nova eldono antaŭ la publiko, Jia Pingwa kaj liaj amikoj ŝatas mencii ankaŭ pakaĵon kovritan de polvoj jam 17 jarojn.

En aŭgusto de 1993, por konsoli Jia

Pinwa en pesimismo, Wei Minglun (1941-) kaj bonaj amikoj de Jia Pingwa s-roj Jin Zheng, Wu Jun kc pakis stakon da librojn *Abolita ĉefurbo*, kaj skribis sur la pakpapero tempon por re-malfermos la pakajon laŭ ilia interkonsento. I.a. Wei Minglun tiel skribis: "Malfermu post 20 jaroj! Mi bondeziras ke post 20 jaroj ĉiuj estu herooj!" Kaj ankaŭ Jia Pingwa skribis sian revon ke li revidos la libron *Abolita ĉefurbo* post 20 jaroj: "Rebrilos tiu ĉi libro post 20 jaroj!"

Ni povas vidi fotojn pri tio en interreto.

### 8 Similaj okazoj

*Abolita ĉefurbo* estas vere interesa kultura signo, kiu dum 17 jaroj vidiĝas kiel reprezentanto de erotika literaturo kaj suferis malpermeson de ŝtata potenco.

Kial, kiel, kiu juĝis ĝin perversa verko? Ĉu tiu juĝo estas prava?

Similaj kazoj okazis multfoje en antikva kaj nuna tempo, en kaj ekster Ĉinio.

Ekde 1745-03-22, Vatikano eĉ proklamis *Biblion* malpermesita libro.

En 1857 la libro *Matrono Bovary* de Flaubert (1821-1880) estis malpermesata, la aŭtoro akuzita. La kulpo de Flaubert estis "laŭdo pri adulto" per sia verko.

En 1880, Maupassant(1850-1893) estis akuzita pro sia poemo *Virino*. Tiam Flaubert elpaŝis pledi por li kaj faris mirigan parolo: "Beleco estas virta. Laŭ mi tio estas principo." *La amato de s-ino Chatterley* de David Herbert Lawrence (1885-1930) publikiĝis en 1928, sed estis malpermesata en Anglio dum 30 jaroj . La eldonejo Pingveno estis akuzita pro la kulpo eldoni erotikan libron. Tiu kondamno estis abolita nur en 1960. ĉinio nuligis malpermeson de *La amato de s-ino Chatterley* en 1982, sed malpermesis la romanon *Abolita ĉefurbo* en 1993 kaj dum 17 jaroj. Kia ironio?

### 9 Fino bona en bonaŭgura dato

Estas ĝojinde, ke post malpli ol 20 jaroj, la dua eldono de *Abolita ĉefurbo* nun aperas, do pli frue ol la aŭtoro supozis. Iu scivole demandus: Sama teksto, sama enhavo, kial ĝi estis malpermesita antaŭe kaj nun povas reaperi?

Ŝanĝiĝis la eldonejo. De Pekina al Verkista. Sed tio ne estas la plej grava kaŭzo. ŝanĝiĝis la cenzura oficejo, ŝanĝiĝis la cenzuristoj, precipe, ŝanĝiĝis la cirkonstanco de socio, liveras la ŝancon por la reapero de *Abolita ĉefurbo*. Sekve Jia Pingwa povas havi la solenan inaŭguron de *Trilogio de Jia Pingwa* en la bonaŭgura dato 2009-08-08, kaj donos siajn aŭtografojn.

*Abolita ĉefurbo* sendube estas unu el la romanoj kun plej granda disputeco de ĉina moderna literaturo. Ĝi travivis mallongan debiton, rapidan malpermeson, furoron de pirataj eldonoj, premiigon en fremda lando kaj finfine reaperon de nova eldono. Trapasinte tiel zigzagan vojon, ĝia denova publikiĝo certe estas grava kultura evento en ĉinio 2009.

### Abolita Ĉefurbo

— laŭ ĉinesko Yujiexing\*

Prohib' oficiala  
pro kaŭzo  
morala.  
Abolita Ĉefurbo  
al sorto fatala:  
Fama libro  
tuj fariĝis  
roman' skandala.

Sed premio reala  
al aŭtor'  
lojala.  
Abolita Ĉefurbo  
revenas formala,  
dank' al ŝanĝoj  
de tempo kaj  
norm' nesamskala.

\* *Yujiexing* (promeno sur palaca strato):  
ĉina fikforma poemo el du strofoj po ok  
versoj de 7,33,76,445 silaboj, laŭ rimaranĝo  
a,xa,xa,xxa (x=senrima).

## Ĉineske

### Imre Szabó (Hungario)

—laŭ ĉinesko Busuanzi\*

## Griza matenveno

Mateno falas  
post griza alven'  
sur nian vastan mondon:  
diabla ekstrem'.

En korprofundo  
briletas la sem':  
spite absorbas ĉion  
tamen la vivem'.

## Ĝardenen pasis printempo

Printempo venis  
nian ĝardenon,  
bunte floras dehiski  
pompan eternon,

altigas herbojn,  
nian kaptenon  
ade forgesigante  
mornan timemon.

## La kvito

Brave li luktis  
ĝis la koratak'!

Jen li: Homo Unika  
kun brilanta ag'!

Ekzemplon donis  
li ĝis tiu tag',  
kiu lin tamen finis  
per kvita pag'.

\**Busuanzi* (aŭguristo): ĉina fikforma poemo  
konsistas el el du strofoj po kvar versoj de 55,75  
silaboj kun duona rimo.

## Ĝangalo

—laŭ ĉinesko Fengrusong\*

Sangas kaj sangas vaste,  
verde dispaste,  
torentas ĉiovore,  
serpente,  
peste-draste,  
kaj ĉion perfortas.  
Ĝi atakas kastre,

batuas ĉion raste,  
mortigas ĉaste,  
ĉar sole rajtas vivi  
solsola nur ĝi laste:  
la fajra ĝangalo  
mondon glutos vaste

\**Fengrusong* (vento inter pinoj): ĉina fikforma  
poemo el du strofoj kun 7 kaj 6 versoj respektive de  
7,5, 734,66 / 7,5,77,66 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,  
xxa,xa / a,a,xa,xa (x=senrima)

### Vejdo (Ĉinio)

## Fraŭlin' Laŭdinda

okaze de la naskiĝtago (2009) de  
Cindy Mckee

—laŭ ĉinesko Qinyuanchun\*

el Usono  
multescia

bela fraŭlin'  
 kolektas fruktojn  
 en parnasa  
 ĉina ĝarden'  
 ŝia obstin'  
 jam produktas  
 ĉineskaĵojn  
 diverspecajn dudek kvin  
 laŭdinde  
 ŝi daŭre strebas  
 por bona fin'

kiel akvamarin'  
 ŝi glimas  
 en ĉineska min'  
 per muza talent'  
 ŝi zorgeme  
 delikate  
 per korinklin'  
 al poezi'  
 de ĉin-stilo  
 verkas pene en fascin'  
 senĉese  
 daŭrigu kara  
 usonanin'



\* *Qinyuanchun* (printempo en la ĝardeno Qin): ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 13 versoj de 444,5444,447,354 / 6, 35, 5444, 447, 354 silaboj laŭ rimaranĝo *xxa,xxxa,xxa,xxa* / *a,xa,xxxa,xxa,xxa* (*x = senrima*)

## Guozhu (Ĉinio)


### Rimgratulo al 70-jara Sceto

—laŭ ĉinesko Hexinlang\*  
 (2009-08-20)

Brava figuro !/  
 Shi Chengtai/ plugas sur la/ nigra ruro./  
 sinofere laboras/ por verda kulturo./  
 Junec' jam en forkuro./

Jubileo fruktodonas/ libron en aĝ' de matura:/  
 Vento Sed/ Kun Spuro.

En-memora gravuro:  
 Penseo,/ ekskurso sur/ granda muro.  
 Venas sepdekjariĝo, /tag' de bonaŭguro.  
 Benadojn/ sen mezuro,  
 al vi sanon, feliĉon,/ longan vivon kun plezuro  
 en bela futuro!



\**Hexinlang* (gratulo al novelzo): ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 11 kaj 12 versoj respektive de 5,344,76,7,78,33 / 7,344,76,34,78,33 silaboj, laŭ rimaranĝo *a,xxa,xa,a,xa,xa* / *a, xxa, xa, xa, xa,xa* (*x=senrima*)

## Karmemore pri Jariĉ

okaze de la 10-jara datreveno de lia forpaso  
 —laŭ ĉinesko Jiangchengzi\*  
 (2009-09-03)

Dek jaroj flugis fore.  
 Adore,  
 memore  
 pri heroa/ Jariĉ honore  
 disvastiĝas bonfamo/ tra l' mondo/ furore.

Ni sekvantoj penas labore,  
 fervore,  
 verdkore.

Vi inspiras/ al ni trezore.  
 La Espero bravura/ aŭdiĝas/ sonore.

\**Jiangchengzi* (riverborda urbo): ĉina fiksforma poemo el du samaj strofoj kun 8 versoj de 7,3,3,45,733 silaboj, laŭ rimaranĝo *a,a,a,xa,xxa*

(x=senrima)

**Cindy Mckee (Usono)****Ruĝa Rivero**

—laŭ ĉinesko Manjianghong \*\*

Argilplena  
riĉruĝo  
de argilo  
mi filtras  
tribajn lingvojn  
en distilo  
likva lango liveras  
voĉojn antaŭ ekzilo  
mi modlas  
likvan poton pri  
vivstilo

Jen suda  
vigilo  
Teksasa  
gracilo  
de vakerkarno  
asimilo  
ruĝigas min ĝis Golfo  
mi paŭzas ĉe pesilo  
hompeza  
miksas mondakvon  
kun ĥilo

*\*La Ruĝa Rivero estas la landlimo inter Teksaso kaj Oklahomo. Antaŭe, Oklahomo estis Indiana Teritorio, kaj nuntempe, la diversaj triboj estas suverenaj, sendependaj nacioj. Sude estas la subŝtato de Teksaso, plena je vakeroj kaj sendependa spirito. La Solstela Ŝtato estis suverena lando dum mallonge. La Ruĝa Rivero estas ruĝa pro la enhavo de argilo.*

*\*\*Majianghong (plenruĝa rivero): ĉina fikforma poemo el du strofoj po 11 versoj de 434,344,77,353 / 33,33,54,77,353 silaboj respektive, laŭ rimaranĝo xxa,xxa,xa,xxa / xa,xa,xa,xa,xxa (x = senrima)*

**George Smith, Asiriologisto**

—laŭ ĉinesko Dielianhua\*\*

bankbileta gravuro-  
la metio.  
Al studplezuro  
li sin donis, futuro—  
venonta aventuro

Asiria kulturo  
en argilo—  
koda obskuro  
nun malferma strukturo  
dank' al tiu figuro

*\*Mi volas skribi ion pri George Smith, kiu malkodis multegajn asiriajn kojnform-skribsistemajn tabulojn, inkluzivante la faman Epopeo pri Gilgameŝo, la plej malnovan verkon iam. Kiam li estis 14-jaraĝa, li devis forlasi lernejon kaj fariĝi lernoknabo de gravurado. Proksima museo tentis lin kaj li instruis sin mem pri kojnskribo tie. Fine, li estis sendita al antikva Ninevo, por trovi pli da pecoj de argitabuloj...nu, anstataŭ komenci la tekston, mi trovis min skribante ĉineskaĵon.*

*\*\*Dielianhua (papilio super floroj): ĉina fikforma poemo el du strofoj po 5 versoj de 7,45,7,7 silaboj, laŭ rimaranĝo a,xa,a,a (x=senrima)*

**Ĉu kapuĉini aŭ ne kapuĉini?**

—laŭ ĉinesko Yulinling\*

Kafeini  
ĝis komenci  
halucini  
Tio estas ĝojo  
Mian menson  
ilumini  
mia celo estas  
jam ne min klini  
al la lit'  
Nur lumadi  
mian tagon ne fini

Mi bezonas urini,  
 doloron  
 povas difini  
 Eĉ artikaj ligoj  
 ĝemas dum  
 determini  
 ĝustan lokon  
 Ĵuras  
 jam ne kapuĉini  
 akre mi  
 dum ekstremaj  
 paŝoj abstini



\*Yulinling (tintado en pluvo): ĉina fikforma poemo el du strofoj kun 11 kaj 12 versoj respektive de 4,44,644, 65, 347 / 7, 35, 634, 426, 345 silaboj, laŭ rimaranĝo a,xa,xxa,xa,xxa / a,xa,xxa,xxa,xxa (x = senrima)

Cindy Mckee  
**Venanta verdestaĵo**  
 —laŭ ĉinesko Fengrusong  
 estaĵo en skulpturo  
 kontraŭ dommuro  
 grimpantoj ĉirkaresas—  
 Ne ploru  
 nia turo  
 ni dancas adore  
 laŭ via konturo

vivanta, verda ŝnuro  
 verda tinkturo  
 elverŝas premimpresojn  
 al sur la blanka puro  
 dum ili amkantas—  
 vi estas nurnuro



\*\*Fengrusong (vento inter pinoj): ĉina fikforma poemo el du strofoj kun 7 kaj 6 versoj respektive de 7,5, 734,66 / 7,5,77,66 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xxa,xa / a,a,xa,xa (x=senrima)

**Helena Tylipska (Italujo)**

## Somerfino

—laŭ ĉinesko Kuxiangsi\*  
 Plenas korbo de l' somer'.  
 Kurtiĝas  
 la vesper'.  
 Merita ripoz' al la ter'  
 alvenas.  
 Jam vinber'  
 odoras  
 en aer'

Disŝiras vent' kun koler'  
 la nubojn.  
 La anser'  
 sin kaŝis ien,ĉe river'.  
 Jam ĉelojn  
 de miel'  
 plenigis  
 la abel'.



\*Kuxiangsi (profunda sopiro): ĉina fikforma poemo el du samaj strofoj po 8 versoj de 7,33,45,733 silaboj, laŭ rimaranĝo a,xa,xa,xxa (x = senrima)

◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇

Eldonas Redakcio de **Penseo**  
 Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Vejdo)  
 Adreso: No.-3-2 de la 5-a etaĝdomo  
 de No. 19, Wujiang St., Jiangbei Distrikto,  
 Chongqing, 400020, Ĉinio  
 Tel: (023) 67095890 (hejme)  
 Poŝtadreso: vejdo@163.com  
 Ĉiujn kontribuajn al la ĉefredaktoro.  
 Por legi pasintajn numerojn de Penseo, vin  
 turnu al [www.elerno.cn/penlisto.htm](http://www.elerno.cn/penlisto.htm) aŭ  
<http://gazetejo.org/eo/penseo>

◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇